# LIGILO

N-ro 16 - OKT/NOV/DEC 1992

## BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Caixa Postal 3625, CEP 70084-970, BRASILIA (DF), Fone: 226-1298


## KARAJ LEGANTOJ

Ĝis LIGILO n-ro 15 D-ro Enivaldo Alves Silva redaktis nian bultenon. Ekde nun la estraro de Brazila Esperanto-Ligo respondecas pri tiu tasko kaj tre dankas al D-ro Enivaldo, kiu dediĉos sin al sciigota grava laboro ene de BEL. Al niaj karaj legantoj ni petas ne estu tro severaj, okaze de multaj eraroj sur la bulteno, ĉar tiuj fuŝaĵoj oni devas aljuĝi al nia manko de antaŭa sperto. Krom tio, tre modestaj estas la teknikaj rimedoj en BEL. Ni revas akiri, estonte, modernan mikrokomputeron, softvaron kaj laseran presilon, kiuj ebligos pli bonan kompostadon.

Bonaj novaĵoj estas la pertempa solvo rilate al spacmanko por la plenumado de taskoj far de BEL. Fondaĵo Almada ricevis novajn donacojn kaj la Perkoresponda Kurso de BEL sukcesas. Krom tio fama Instituto de Homeopatia, em Brazilo, adoptis Esperanton por dulingva eldono de sia faka revuo.

Bedaŭrinde ni ankaŭ havas malagrablan informon: la apero de ruzuloj, kiuj uzas la nomon de esperantistoj kaj de Esperanto mem por sukcesi monon per "leterĉeno" Estu atenta por rifuzi tian "proponon".

La mondo transformiĝas kaj multaj ŝanĝoj venas sub la signo de la milito, malamo, kontraŭstaro. Elstaris, ke antaŭjuĝo, naciismo kaj rasismo ne malaperas aŭ fariĝas pli mildaj sub la influo de la edukado. Por ni, kiu vidas translimen kaj ofte sopiras transkontinenten, estas malfacile akcepti tiun mondan bildon.
Sed tamen, ni esperantistoj plugas en la kampo de la Espero, metias pri revoj, kiam ilas per la fido kaj kredo je la homa amkapablo. Do, malgraŭ militoj kaj atakoj ni levu la torĉon de nia Espero kaj esprimu niajn bondezirojn al ĉiuj samideanoj dise en la mondom, okaze de la Kristnasko. BEL-Estraro deziras al vi brilajn festojn kaj ke 1993 alportu al la homoj kvanton da racio kaj saĝo, emo al kunlaboro, paco kaj homa respekto.



# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO (BEL)

Aperas trimonate.
Redaktoro: BEL-Estraro.

ESTRARO DE BEL:

PREZIDANTO : Néia Lúcia Souza
VIC-PREZIDANTO : Francisco Mattos de Oliveira
1-a SEKRETARIO : José Carlos Dorini Ramos
2-a SEKRETARIO : Wilson Álvares de Oliveira
3-a SEKRETARIO : Lício de Almeida Castro
1-a KASISTO : Aymoré Vaz Pinto
2-a KASISTO : Maria das Dores Goes

KONTROLKOMISIONO:
Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

ANSTATAŬANTOJ:
Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

PERKORESPONDA KURSO : Carlos Maria

KOMITATANO "A" : Symilde Schenk Ledon

## ŜANĜO DE UEA-ĈEFDELEGITO POR BRAZILO

Dum la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Anápolis, okazis multaj ŝanĝoj en gravaj postenoj de la brazila movado, el kiuj ni reliefigas la UEA-Ĉefdelegiton. Oni elektis S-inon SYMILDE SCHENK LEDON por plenumi tian taskon. Ĝis la ŝanĝo S-ro JORGE DAS NEVES efike rolis kiel UEA-Ĉefdelegito. BEL-Estraro profitas la okazon por danki kaj gratuli S-non JORGE DAS NEVES pro sia sindonema kaj senlaca laboro kies rikolto estas la pligrandigo de la delegita reto kaj trofeo Fyne kiuj honoras la brazilan esperantistaron. Al S-ino SYMILDE ni deziras plensukceson!

# FONDAĴO ALMADA

BEL ricevis leteron de S-ino Marija Pozder Almada, responde al sia peto, kiu enhavas informojn pri la agado en Esperanto-Movado de ŝia karmemora Francisco de Souza Almada, kies nomo honoras nian Fondaĵon. Plezure ni ĝin transkribas:

S-ro Francisco de Souza Almada ellernis la Internacian Lingvon sola, en la jaro 1948-a. Por ekzercadi ĝin li uzis la korespondan interŝanĝon kun alilandanoj. Li tuj organizis grupon al kiu li instruis samtempe dum li lernis la lingvon kaj finis la kurson 23 personoj en Santos (SP). Kiel funkciulo de Banco do Brasil li ofte vojaĝis kaj eluzinte la okazojn li propagandis pri Esperanto, farinte paroladojn. Li estis unu el la fondintoj de la Kultura Kooperativo de Esperanto (KKE) en Rio de Janeiro (RJ). Li estis ano de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Sanpaula Esperanto-Societo, al kiu helpis aĉeti la propran sidejon. Partoprenis brazilajn kongresojn de Esperanto en Belo Horizonte (MG) kaj Rio de Janeiro. Estis ano de UEA kaj delegito pri bankaj aferoj. En la jaro 1961-a li la unuanfojon vojaĝis al Universala Kongreso en Harogett, Anglio. En la Jaro 1963-a organizis Esperantan Renkontiĝon en Santos, kie li estis prezidanto de la Centro Esperantista de Santos, kie li daŭre instruis. En 1970-a jaro li esperantigis la aŭtobiografion de la fama futbalisto "Pelé" kiu estis lanĉita en 1971-a jaro dum la Seminario de Kultura Kooperativo de Esperanto, en Campos (RJ). Grupo de esperantistoj en la jaro 1974-a intencis kaj fondis la Brazilan Konsilantaron de Esperanto kaj elektis F.S.Almada por prezidi ĝin. Li estante prezidanto arde laboris por ekmovigi la esperantistaron kaj vigligi la movadon en Brazilo. Dum tiuj 8 jaroj, kunlaborinte kun ĉiuj, organizis la unuan Latinamerikan Kongreson en Marilia (SP) kune kun KKE kaj kun grupo el Marília. Li dume iĝis dumviva membro de UEA kaj membro de la Societo Zamenhof, kiu subtenas UEA-on. Li estis unu el la grupo de esperantistoj kiuj invitis la 66-an UK-on al nia lando. Li eldonis dulingvan lernolibron "Esperanto Elementar", el kies dua eldono poştrestas nur kelkaj ekzempleroj. Je peto de UEA, li tradukadis esperantajn artikolojn, kiujn sendadis UEA al li kaj kunlaborinte kun la loka gazeto "A Tribuna", semajne aperigis artikolojn pri Esperanto. En Santos estis de li organizita la Seminario de KKE en la jaro 1977-a. Okaze de tio li sukcesis starigi buston de L.L.Zamenhof sur grava placo en la urbo kaj placon "Praça Esperanto" en fora kvartalo de Santos. Sub lia aŭspicio estis organizita la unua Sudbrazila Renkontiĝo en Porto Alegre (RS). La Unuan Kongreson de Brazila Konsilantaro de Esperanto li organizis en Juiz de Fora (MG), kie li sukcesis starigi la buston de Zamenhof. Intertempe en Santos aĉetis kaj donis domon por la Centro Esperantista de Santos "Kultura Centro de Esperanto" kiu domo estis je dispono de esperantistoj ĝis lia morto. Almada prezidis la kampanjon por aĉeto de propra sidejo de BKE en Brasília (DF), kiun nun okupas la Ligo. Dume li partopreprenis diversajn Universalajn Kongresojn. Dum la 68-a UK en Budapesto, Hungario. li estis elektita Honora Membro de UEA, pro lia malavara, sindona kaj senĉesa agado por esperanta movado. La 25-an de junio de 1990-a jaro li forpasis.

## PLIAJ DONACOJ

De la lasta Ligilo ĝis nun, jen la donacoj ricevitaj de BEL:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Alberto Flores | 215.800,00 | Jason Gonçalves de Lima | 264.000,00 |
| Carlos Fernando P Ramos | 258.700,00 | Joaquim do Couto | 1.000.000,00 |
| Délio Pereira de Souza | 200.000,00 | Paulo Cesar S Oliveira | 220.220,00 |
| Enzo Forgiarini | 270.000,00 | Raul Conde | 740.800,00 |
| Evaristo Manoel Pereira | 350.000,00 | Regina Margarida M Lemos. | 300.000,00 |
| Felicissimo Rosa Borges | 203.320,00 | Sidney Assis Brasil | 73.843,00 |

Al ĉiuj BEL-Estraro sincere dankas!

## 2-a INTERLANDA KONFERENCO PRI INSTRUADO ARGENTINA-BRAZILA

La UEA-Ĉefdelegito por Brazilo, S-ino SYMILDE SCHENK LEDON, partoprenis la 2-an Interlandan Konferencon pri Instruado (deklarita Municipa Intereso laŭ Rezolucio 303/92) kaj sendis al BEL raporton, kiun ni transkribas, kaj samtempe gratulas S-inon SYMILDE, la partoprenintojn kaj la organizintojn de tiu IKI.

Loka Konferenca Organizanto: "Saenzpenja Esperanto-Klubo"

IKI-Kunordiganto: Rubén Teofil Diaconu

Apogaj instancoj:
- Comisión de la Fiesta Nacional del Algodón (Komisiono de Nacia Festo de Kotono)
- Hotel Gualok (Hotelo Gualok)
- Municipalidad de la Ciudad de Pcia. Roque Saenz Pena (Municipo de Urbo Placo R.S.Penja)
- Comisión de Sindicato "Luz y Fuerza" de Pcia. R.S.Pena (Sindikata Komisiono "Lumo kaj Forto" de Placo R.S.Penja)
- Comisión direktiva de la Sociedad Yugoslava (Estrara komisiono de Asocio Iugoslava)

Valoraj kontribuoj de:
Raul Palomino, Berna Morzan, Victor O.Fernández, Erica R.Frías, Iony Stacul, Patrícia A. Oteiza, Alicia A. de Gomez, Orlando Leris Barboza, Ana M. de Pacheco.


Aŭspiciantoj:
- Argentina Esperanto-Asocio
- Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
- Internacia Esperanto-Instituto
- Argentina Esperantista Junulara Organizo

Cirkaŭ 30 partoprenantoj ĉeestis la solenan malfermon de la 2-a IKI, la 9-an de oktobro/92, vendrede, la 20-an horon, inter kiuj pluraj lokaj aŭtoritatuloj kaj reprezentantoj de Brazilo (ŝtatoj São Paulo kaj Rio Grande do Sul). La ĉefdelegito de UEA en Brazilo, S-ino Symilde S. Ledon salutis nome de Brazila Esperanto-Ligo kaj prelegis sabate, la 10-an/10/92 pri "Didaktitaj Metodoj de Instruado" kaj poste pri ILEI-Informoj dum la 77-a UKE en Vieno kiel ankaŭ dum tria ero dimanĉe la 11-an/10/92, skizo-raporto de la Universala Kongreso, 1992, UEA. Rubén T. Diaconu gvidis la programerojn kun organiza kapablo de komence ĝis la fino: prezentado de prelegantoj, mempreleganto pri "Instruado por infanoj", gvidado-promenado al Placo Belgrano kaj "Zamenhof-Placeto", omaĝo al veteranoj, kie ĉeestis elstara esperantisto Jorge Abraham, kiu prelegis rilate al "Instruado-korekta prononcado de Esperanto-vortoj"; lunde, je fermo, la 12-an/10/92 li kunordigis grupan pritrakton de la konferenca temo kun prezento de konkludoj, atestildisdono, fermo-adiaŭo. Ankaŭ interesaj kontribuoj estis la prelego de Iony Stacul, Argent-ejo prezidantino,: "Didaktiko por Infanoj"; de samideano Juan C. Salas pri la E-Kongreso de Argentino, en Mar Del Plata, aŭgusto 92; samideano Gilbert R. Ledon pri SAT; samideano Ivo Sanguinetti elmontris lumbildojn pri diversaj vojaĝoj. La amikeca vespermanĝo ofertita de la LKO en Hotelo Gualok kie okazis la konferencaj sesioj, refortigis la favoran impreson de partoprenantoj. La 3-a IKI, konfirmota, verŝajne okazos en Porto Alegre (RS).

# PLIA ĈAMBRO POR BEL-ESTRARO

Tre bonan novaĵon BEL-Estraro sciigas pere de ĉi tiu LIGILO. Tuj post sia enposteniĝo la estraro de BEL ricevis proponon de esperantisto de Brasília similan al vera sonĝo: la uzado de ĉambro proksima al BEL-sidejo, senpage, ĝis la fino de la jaro 1994. Kompreneble BEL-Estraro tuj akceptis la proponon kaj pritraktis detalojn. Oni decidis, ke BEL pagos la ordinarajn elspezojn rilate al telefono, lumo, akvo,.konservado, komuna administra kotizo. La sekva paŝo estis purigi kaj farbi la ĉambron. Adolpho, sia edzino Dayse, kaj Dorini zorgis pri tio. Post tio okazis la translokigo de libroj kaj mikrokomputero de sidejo I al sidejo II (tiel oni nomis la novan ĉambron). Sed mankis mebloj kaj tajpiloj. Pro la entuziasmiga etoso, BEL-Estraro decidis "frapi" la pordon de ŝtata organizo. Nova granda surprizo! Ministerio pri Sano aŭdis nin kaj donacis laŭ sia interna regularo ne uzeblajn elektrajn tajpilojn, bretarojn, tablojn, akvotrinkejojn, seĝojn, metalajn dokumentujojn k.a. Oni bezonis lui kamionon por transporti la aĵojn. Kelkaj donacaĵoj postulis riparojn, sed nun preskaŭ ĉio bone funkcias. Tamen ĉio havas prezon. Por plenumi diversajn urĝajn agojn tiucele , inkluzive la tutan reorganizadon de sia administra laborsistemo, la estraro de BEL estis devigata prokrasti kelkajn rutinajn taskojn, ĉefe rilate al la sekretario. Sed la estraro estas konvinkinta, ke la decido estas prava kaj esperas, ke la legantoj ankaŭ samopiniu. Krom la bonvolo de la esperantistaro, oni ankaŭ esperas, ke ĝis la fino de 1994, kiam BEL redonos la ĉambron, Fondaĵo Almada havos sufiĉe da mono por akiri taŭgan ĉambron, ĉar se tio ne okazos, oni ne sukcesos enmeti en BEL-sidejon la meblaron, kiun nun la estraro tre kontente posedas. Ĝis nun la ŝparkonto de Fondaĵo Almada havas ĉirkaŭ Cr$ 10.000.000,00, kaj ĉambro simila al tiu de sidejo II kostas Cr$ 100.000.000,00, t.e. la Fondaĵo havas 10%-n de la bezonata sumo. La luo de sidejo valoras Cr$ 1.000.000,00. Do se BEL uzos tiun ĉambron ĝis dezembro de 1994, tio signifas, ke la esperantisto, kiu ĝin "pruntedonis", kvazaŭ donacis Cr$ 25.000.000,00. Kiu kuraĝas imiti lin? . . .

**Sub aperas parto de la "pruntedonita" ĉambro kun kelkaj donacaĵoj**



## CURSO POR CORRESPONDÊNCIA

**Desde o início de suas atividades, em 21.12.91,** até 4.11.92, o Curso Básico de Esperanto **por Correspondência ministrado pela Liga** Brasileira de Esperanto **registrou 166 matrículas individuais e 81 em grupos, com cerca de 650 alunos em quase todos os estados brasileiros. Grande parte dos grupos de estudo foram formados dentro de instituições espíritas, em consequência da "Campanha Brasil Esperantista", iniciada no começo de 1991. Brevemente será reiniciada a campanha agora também no meio católico, com a colaboração de dois eminentes católicos esperantistas. O número de alunos ultrapassou em muito a meta** dos 500 participantes **previstos para 1992.** A Coordenadoria do Curso espera dobrar esses números no **próximo ano, pois quase todos os** serviços relativos ao acompanhamento dos estu**dos estão sendo computadorizados.** Está previsto, ainda, o aporte de mais um ele**mento para a equipe responsável pelo** curso. Além dos três primeiros alunos a **concluírem o curso, cujos nomes foram** publicados anteriormente, receberam Certi**ficado de Conclusão os seguintes:**

| | |
|---|---|
| Alício Iran do Nascimento | Luis Antonio Castro Henriques |
| Ana Celeste Alievi | Lourdes Teixeira da Silva |
| André Luiz Francisco Ferreira | Marcílio Bezerra de Oliveira |
| Bilha Palma | Marcus Roberto Gehrmann |
| Cynara Visentin de Moraes | Maria da Piedade Monteiro |
| Delza de Andrade | Maria Luisa Pascher |
| Dulcinéia Ribeiro Leo | Maria Luiza de Almeida Cesar |
| Egídio Ianibelli Neto | Maria Socorro Bezerra Chaves |
| Erdner Costa Júnior | Mauro da Cunha Villela Nunes |
| Frederico José Andries Lopes | Milton Serra |
| Geraldo da Cruz Carvalho | Mircia Barreti Roman |
| Gláucia Maria C. Vieira de Melo | Nélio Vicente Costa |
| Jerônimo Portela de Souza | Nelma Elisa de Freitas |
| Jerusa Valim Almeida | Osmarina Sant'Anna Vaz |
| João Bosco Lemes | Paulo Roberto Siqueira Silva |
| João Ferreira Gonçalves | Sérgio Francisco do Nascimento |
| João Paulo do Nascimento | Suely Teixeira de Gouveia Marques |
| Jomar Teodoro Gontijo | Tarcísio Nunes Filgueiras Jr. |
| José Benedito Almeida | Telvi de Oliveira Ferreira da Costa |
| José Ferreira da Costa Filho | Tiago Courrol Ramos |
| Judith Brito de Paiva e Souza | Valéria Ferreira Gonçalves |
| Leopércio Turello | Véra Lúcia Machado |

## O MÉTODO DE ZAGREB SERÁ SUCESSO TAMBÉM EM PORTUGUÊS

A Zamenhof Editores acaba de lançar em português o mundialmente conhecido "Aprenda Esperanto - Método de Zagreb", editado originalmente em servo-croata e com edições em inglês, francês, alemão, italiano, maltês, catalão, kirundi, húngaro e macedônio. "Aprenda Esperanto - Método de Zagreb" é indicado para o ensino em sala de aula e para autodidatas, tendo sido elaborado com base nos 500 radicais mais frequentes. Traduzido por Ronilson M. Mota e revisado por Leopoldo H. Knoedt, com 56 páginas e uma belíssima capa, o livro será distribuído com exclusividade pela Liga, que concederá desconto de 30 % e prazo de 30 dias para compras a partir de 5 exemplares. Preço de lançamento, até 31.12.92: Cr$ 30.000,00. Faça já o seu pedido. A Zamenhof Editores promete para breve o lançamento da fita que acompanha o método.

## BOLETIM DE ADESÃO - ANO 1993

Nome ______________________________ [__________]

Endereço ______________________________

CEP ________ - ____ Cidade ______________________________ UF ____

Telefone DDD [____] ______________ Data de nascimento ____/____/____

Profissão ou especialidade ______________________________

Nível de escolaridade: [ ] 1º grau [ ] 2º grau [ ] superior

Data ___/___/___ Assinatura ______________________________

1.LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

[ ] SI-Sócio Contribuinte (valor correspondente a 150 selos carta comum)......Cr$ ________

[ ] SF-Familiar de Sócio (metade do valor do SI)..............................Cr$ ________

[ ] SE-Estudante - somente p/ menores de 30 anos.(metade do valor do SI)......Cr$ ________

[ ] SC-Sócio Colaborador - (a partir do dobro do valor do SI)................Cr$ ________

[ ] SV-Sócio Vitalício - (30 vezes o valor do SI)............................Cr$ ________

[ ] Donativo para as despesas gerais da Liga.................................Cr$ ________

[ ] Fundação Almada (contribuição específica para aquisição de nova sede.. Serão considerados fundadores aqueles que, até o 29º Congresso Brasilei-.. ro de Esperanto - julho/93 - contribuirem com valor no mínimo igual a 26.. dolares no paralelo, conforme decidido no Congresso de Anápolis).........Cr$ ________

TOTAL DO ITEM 1..................Cr$

==================

2.ASSOCIAÇÃO MUNDIAL DE ESPERANTO (UEA)

[ ] MG-Recebe apenas o MANUAL sobre o movimento esperantista......8 gld(*)..Cr$ ________________

[ ] MJ-Recebe o ANUÁRIO (JARLIBRO). Se menor de 30 anos também recebe a revista KONTAKTO........................................20 gld(*)..Cr$ ________________

[ ] MA-Recebe o ANUÁRIO e a revista ESPERANTO. Se menor de 30 anos também recebe a revista KONTAKTO...........................48 gld(*)..Cr$ ________________

[ ] DM-Recebe o ANUÁRIO e a revista ESPERANTO por toda a vida. Enquanto menor de 30 anos também recebe a revista KONTAKTO..1.200 gld(*)..Cr$ ________________

TOTAL DO ITEM 2..................Cr$

===================

3.ASSINATURA DE JORNAIS E REVISTAS

(Assinalar no verso) TOTAL DO ITEM 3..................Cr$

===================

4.SOMENTE PARA NÃO SÓCIO DA LIGA ANO 1992

Despesas de remessa para o exterior ( 20% sobre as totais dos itens 2 e 3)....Cr$ ________________

TOTAL A PAGAR (Soma geral)......Cr$

===================

(*) Para efeito deste boletim, cada gld (Florim Holandês) equivale a 65 % do valor do dolar comercial para venda.

## JORNAIS E REVISTAS PARA ASSINATURAS

| | | Gld | Cr$ |
|---|---|---|---|
| [ ] | BULGARA ESPERANTISTO - mensal, via superfície | 38,40 | ................ |
| [ ] | DIA REGNO - mensal, 2 vezes por ano, via aérea | 30,00 | ................ |
| [ ] | EKONOMIA BULTENO PRI USONO - mensal, via aérea | 24,80 | ................ |
| [ ] | EVENTOJ - 2 vezes ao mes, via aérea | 30,00 | ................ |
| [ ] | EL POPOLA CINIO - mensal, via aérea (Informar: assinatura nova [ ] ou renovação [ ]) | 22.15 | ................ |
| [ ] | ESPERANTO - revista da UEA, 11 números por ano, via aérea | 28,00 | ................ |
| [ ] | HEROLDO DE ESPERANTO - jornal, 16 vezes por ano, via aérea | 56,00 | ................ |
| [ ] | ILTIS-FORUMO - 3 vezes ao ano, via superfície | 36,00 | ................ |
| [ ] | INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO - 4 vezes ao ano | 22,60 | ................ |
| [ ] | ISRAELA ESPERANTISTO - 3 vezes ao ano, via superfície | 21,00 | ................ |
| [ ] | JUNA AMIKO - 4 vezes ao ano, via aérea: | | |
| | - Assinatura única: [ ] | 10,00 | ................ |
| | - Assinatura conjunta: [quantas?: ] a partir de 2, cada assinatura custa | 8,00 | ................ |
| | [quantas?: ] a partir de 6, casa assinatura custa | 7,00 | ................ |
| | [quantas?: ] a partir de 25, cada assinatura custa | 5,00 | ................ |
| | (Os exemplares de cada conjunto de assinaturas serão remetidos a um só endereço) | | |
| [ ] | KONTAKTO - 3 vezes ao ano, via aérea | 14,00 | ................ |
| [ ] | LA ESPERO EL KOREIO - 2 vezes ao ano, via aérea | 16,60 | ................ |
| [ ] | LA GAZETO - 5 vezes ao ano, via aérea | 58,00 | ................ |
| [ ] | LA JARO - calendário da revista MONATO [ ] - via aérea | 14,00 | ................ |
| | [ ] - via superfície | 10,00 | ................ |
| [ ] | LA KANCERKLINIKO [ ] - via aérea | 40,70 | ................ |
| | [ ] - via superfície | 30,00 | ................ |
| [ ] | LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO - 4 vezes ao ano, aérea | 48,00 | ................ |
| [ ] | LA VERDA LUPEO/FENIKSO (Esperanto-Ligo Filatelista) 3 vezes ao ano, via aérea | 24,00 | ................ |
| [ ] | LAUTE - 2 vezes ao ano [ ] - via aérea | 32,00 | ................ |
| | [ ] - via superfície | 16,00 | ................ |
| [ ] | LITERATURA FOIRO - 2 vezes ao ano [ ] - via aérea | 81,66 | ................ |
| | [ ] - via superfície | 62,45 | ................ |

[ ] MEDICINA KURIERO - 4 vezes ao ano, assinatura por 3 anos............................ 18,00 ..................

[ ] MEDICINA INTERNACIA REVUO - 2 vezes ao ano, assinatura por 1 ano, (quem assina MIR re-recebe Medicina Kuriero por 3 anos, embora receba MIR por apenas 1 ano)............... 36,00 ..................

[ ] MONATO - mensal, revista de atualidades [ ] - via aérea........................ 64,00 ..................

[ ] - via superfície....................... 53,00 ..................

[ ] MUZIKO - boletim sobre música............................................ 15,39 ..................

[ ] NIA BULTENO - (Portugala Esperanto-Asocio) 2 vezes ao ano, via superfície............ 7,60 ..................

[ ] OOMOTO - 2 vezes ao ano, via aérea........................................ 18,20 ..................

[ ] ROK-GAZET' - (música Rock), 4 vezes ao ano.................................. 30,77 ..................

[ ] RUSLANDA ESPERANTISTO - mensal............................................ 18,00 ..................

[ ] SCIENCA REVUO - via aérea................................................ 38,50 ..................

[ ] SENNACIULO - (Sennacieca Asocio Tutmonda).................................. 19,00 ..................

[ ] SIMPOZIO - (Associação Mundial de Filosofia), 2 vezes ao ano.................... 8,60 ..................

[ ] TEJO TUTMONDE - 2 vezes ao ano........................................... 22,50 ..................

[ ] TUTMONDAJ SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ - (Academia Sinica, China), 4 vezes ao ano

- via aérea: [ ] - 1 ano......................... 27,60 ..................

[ ] - 2 anos........................ 51,70 ..................

[ ] - 3 anos........................ 80,00 ..................

- via superfície: [ ] - 1 ano......................... 13,80 ..................

[ ] - 2 anos........................ 24,10 ..................

[ ] - 3 anos........................ 37,90 ..................

(Assinale as publicações pretendidas; multiplique o valor de cada uma por 65 % da cotação do dolar comercial para venda; transcreva o valor assim obtido para a última coluna; some os valores da última coluna e transcreva o montante obtido para o "TOTAL DO ITEM 3" no anverso deste formulário)

# INFORMADO EN . . .

KATOLIKA MEDIO

La junulara katolika grupo nomita "Sekvu min" organizis ĝinkanon inter siaj sekcioj funkciantaj en diversaj preĝejoj de Braziljo. Unu el la taskoj estis prezenti esperanto-parolanton. Ses el la konkurantaj grupoj estis bonŝancaj kaj la rezulto estis ses esperantistoj sur la podio. Tiam estis okazo por montri la esperanto-parolatan kaj informi pri la lingvo kaj movado. Inter la esperantistoj tie estis BEL-Vicprezidanto Francisco Mattos de Oliveira kaj la prezidanto de Esperanto-Asocio de Brasília, Hermano Studart Albuquerque. Cele al reliefigo de la partopreno de Esperanto en la evento, BEL liveris premion por esti aljuĝata al la ĝinkana venkanto, nome: unu perkoresponda kurso. La grupo "Sekvu min" planas agadi en la tuta katolika eklezio ĉi tie kaj eldoni bultenon por sia anaro. Ili disponigis al Esperanto spacon por disvastigado. La partopreno de esperanto en la evento ŝuldiĝas al fraŭlino, kiu lernis la lingvon kaj deĵoris iom da tempo en Esperanto-Asocio de Brasília. La rikolto ĉiam okazas kiam oni semas . . .

UNIVERSITATA MEDIO

La profesoro de la lernobjekto "Teorio pri amaskomunikado", ero de la kurso Socia Komunikado funkcianta en la Fakultato "CEUB", en Braziljo, NEWTON DE OLIVEIRA QUIRINO, de kelkaj jaroj postulas de siaj studentoj serĉadon pri Esperanto, kiam li indikas Ligon kaj Esperanto-Asocion de Brasília kiel informfontoj. Ĉi-semestre la studentoj proponis kaj la fakultata estraro aprobis la starigon de Esperanta Kurso. Profesoro Quirino kune kun BEL kaj EAB prezentos projekton cele al funkciado de kurso venontsemestre.

EKOLOGIA MEDIO

Okazis en Braziljo, de la 27-a ĝis la 29-a de novembro, samtempe al la "Interparmenta Konferenco pri Medio kaj Disvolviĝo" la "5-a Nacia Renkontiĝo de Sendependaj Ekologiismaj Institucioj". Ambaŭ eventoj estas sekvo de la diskutoj entrepranitaj kadre de "EKO-92" (julio/92, Rio de Janeiro). La konferencon ĉeestis S-ino Úrsula Grattapaglia. Ŝi akompanis italan deputiton (Radikala Partio), S-ino Emma Bonino, kiu en la ĝenerala prezento parolis emfaze pri Esperanto. Estis oportuno transdoni al interesatoj la plurlingvan informilon, preparita ankoraŭ por "EKO-92". Unu el la vesperoj de la konferenco S-ino Emma uzis por viziti BEL-sidejon, kie klopodis varbi apogantojn al ŝia Partio. En la Renkontiĝo de Sendependaj Ekologiismaj Institucioj BEL uzis standon, kie eblis ekspozicii afiŝojn, revuojn kaj librojn kaj informi pri Esperanto. Krome, ĝi partoprenis kiel observanta institucio . La plej grava rezulto de la partopreno en tiu evento estis la ŝanco kontakti reprezentantojn el la ekologia medio el la tuta lando kaj preni informojn pri diversaj aliaj okazontaj eventoj. Ni dankas S-inon Úrsula pro ŝia kunlaboro dum la renkontiĝo.

NI DANKAS

Al S-ro Evaldo Pauli, kiu dum la lastaj tri jaroj estis Komitatano "A" kaj reprezentis BEL-on en la Komitato, supera organo de Universala Esperanto-Asocio. Por anstataŭi lin la Federacia Konsilantaro de BEL elektis, ankoraŭ en la 28-a BKE (Anápolis-GO), S-inon Symilde S.Ledon, kiu oficos dum la venontaj tri jaroj.

## INSTITUTO DE HOMEOPATIA ADOTA O ESPERANTO

O Instituto de Homeopatia François Lamasson (IHFL), órgão formador de especialistas em Homeopatia, nas áreas de Farmácia, Odontologia, Medicina e Veterinária, passou a editar sua revista "Pesquisa Homeopática" em forma bilíngue Esperanto - Português. Assim, o IHFL estará divulgando a Homeopatia brasileira para outros paises e dando um passo na demonstração de que o Esperanto é um instrumento importante na veiculação do progresso científico nas várias áreas do saber. Em 12.12.92, em Goiânia, com a presença do sr. Presidente do IHFL, Dr. IZAO CARNEIRO SOARES, de homeopatas e de esperantistas, será oficialmente lançada aquela revista, como parte das festividades de comemoração do dia de Zamenhof, organizadas pelo Instituto Goiano de Esperanto.

## 54-a TUTAMERIKA MEDICINA KONGRESO DE HOMEOPATIO

De la 25-a ĝis la 29-a de julio 1993 okazos en la urbo RIBEIRÃO PRETO (SP), la 54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio, kiu flanke de la programo por profesiuloj prezentos ankaŭ programerojn por la ĝenerala publiko. Inter ili ni mencias "Kurson de homeopatio en la hejmo" kaj "Lanĉon de libro de Homeopatio". Ambaŭ eroj estos esperantlingvaj. Ĉiuj kiuj interesiĝas pri la temo rajtas aliĝi al tiu kongreso. Pliajn informojn petu de: IHFL, Rua Américo Brasiliense 1418, CEP 14015-050 telefona n-ro (016) 636-8889 RIBEIRÃO PRETO (SP).

### ALVOKO EL TRENTA ESPERANTO-ASOCIO

La Agentejo de Turisma Promocio de la Trenta Regiono (Italio) publikigis du belajn broŝuretojn pri vintra kaj somera sezonoj, en Esperanto. Por stimuli la turisman agentejon favore al Esperanto, la esperantistoj el Trento petas ke ĉiuj skribu al la suba adreso por ricevi SENPAGE ekzemplerojn de la broŝuretoj. Sendu tuj vian peton al:

APT-AZIENDA DI PROMOZIONE TURISTICA DEL TRENTINO
I - 38100 TRENTO - Via Sighele 3, ITALIO.

### ARGENTINA ESPERANTO-LIGO INVITAS

AEL invitas al la SEMINARIO DE ESPERANTO, okazonta de la 8-a ĝis la 11-a de aprilo 1993, en Villa Carlos Paz (montaro de Córdoba). En la programo estas da debat-prelego en la hispana lingvo "Ĉu estas necesa internacia lingvo?", kun invito al intelektuloj, lingvistikistoj, kulturaj kaj edukaj societoj. En Esperanto okazos la debat-prelego "Informado kaj Instruado de Esperanto", la prelego "La scienco kaj Esperanto", Kafo-koncerto (arta festa kunveno tute en Esperanto), jarkunveno de Argentina Esperanto-Ligo, promenado en la urbo kaj al la montaro de Córdoba.

### SPIRITA JARLIBRO 1993

BEL jam ricevis, por la biblioteko, ekzempleron de la Jarlibro eldonita de Instituto pri disvastigado de Spiritismo" (IDE, portugallingve). En la rubriko "Esperanto em tópicos", aperas artikolo de samideano Alberto Flores kaj diversaj informoj pri Esperanto en la mondo. Inter ili estas notoj pri la omaĝo al Ismael Gomes Braga okaze de la centjariĝo de lia naskiĝo, kaj pri la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto. Entute la rubriko okupas ok paĝojn.

# EVENTOJ

NI ĜUOS LA 30-an BRAZILAN KONGRESON DE ESPERANTO EN NATAL (RN) - 1994

La nordorienta esperantistaro invitas la 30-an BKE al Natal. Ĝi okazos sub la respondeco de Potigvara Esperanto-Asocio kaj kun la apogo de ĉiuj nordorientaj asocioj. Ni invitas ĉiujn ĉeesti la 29-an BKE en São Paulo, venontjare, kaj tie kapti la okazon por senprokraste aliĝi al la 30-a kaj ne riski maltrafi la ravajn tropikajn plaĝojn en Rio Grande do Norte, kompreneble nur post la kongresaj taskoj.

5-a LABORKUNSIDO DE NORDORIENTAJ ESPERANTAJ-ASOCIOJ

Alagoana Asocio de Esperanto informas, ke la 5-a Laborkunsido de Nordorientaj Esperanto-Asocioj okazis bonorde kaj ke la decidojn tie prenitajn ili sendos al BEL, oportune. Ĉeestis la eventon 29 geesperantistoj kiuj reprezentis Esperantajn Asociojn el Natal (RN), Campina Grande kaj João Pessoa (PB), Cabo kaj Recife (PE) Fortaleza (CE), Aracajú (SE) kaj Maceió (AL). La 6-a Laborkunsido okazos en Recife, marto/93. Unu el la decidoj de la Laborkunsido estis inviti la 30-an Brazilan Kongreson de Esperanto al Natal (RN), okazonta en 1994.

INTERNACIA KONFERENCO DE AMERIKAJ ESPERANTAJ-ASOCIOJ

Okazos en Havano, unua semajno de marto 1993, sub la zorgoj de KUBA ESPERANTO-ASOCIO (KEA), kaj celas plivastigi iliajn internaciajn kontaktojn. La letero de samideano Orlando Raola González, respondeculo de KEA pri Publikaj kaj Internaciaj Rilatoj tekstas: "Memkompreneble, la sukceso de tiu aranĝo dependas de la reeño de tiu ĉi mondregiono (Ameriko)". Kiam, en 1988 KEA okazigis la konferencon "Esperanto' 88", 12 brazilanoj sukcesis vojaĝi tien. Ni pensu kion ni povas fari ĉi-okaze por helpi kaj reprezenti la brazilajn esperantistojn en Kubo. Tiuj kiuj antaŭvidas eblecon por ĉeesti la konferencon bonvolu kontakti BEL-on. Laŭ faldfolio recivita de BEL, Kuba Esperanto-Asocio disponas pri propra domo ( sidejo de la Asocio), kun pluraj ĉambroj, el kiuj du estas speciale rezervitaj por gastoj kun kapacito por 12 personoj. Tranokto kun matenmango kostas 10.00 USD. En la sidejo la Asocio ofertas jenajn servojn al la membraro: biblioteko, videohalo, kafejo. Ili invitas ĉiujn viziti ilin kaj nepre antaŭanonci la alvenon.

29-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
14-a BRAZILA ESPERANTA JUNULARA KONGRESO
San-Paŭlo, 12 - 17/7/92

Temo: Homaj manifestiĝoj rilate al Esperanto
Kongresejo: Universitato Mackenzie
Kontaktadreso: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo
Rua Faustolo 124
05041 - San-Paŭlo (SP)

LKK: Prezidanto - Gilbert R. Ledon
Sekretariino - Symilde S. Ledon
Kasisto - José M. Coelho

SAN-PAULO KONGRESEROJ N-RO 1 estas la interesoveka unua informilo preparita de LKK kaj dissendita, oktobre, al BEL-anaro. Se iu ne rivecis ĝin, bonvolu peti ekzempleron de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo.

## KONDOLENCOJ

D-ro EZEQUIAS RAIMUNDO ALVES (1924-1992)

La lastan 21-an de oktobro, pro pulma malsano, forpasis unu el la fondintoj de Alagona Asocio de Esperanto (AAE). Ezequias estis membro de AAE ekde ĝia fondiĝo en 1971 kaj de 1973 ĝis 1987 li ludis rolonjn de unua sekretario, dua kasisto, vic-prezidanto dum 7 sinsekvaj estrarperiodoj. Krom tio li ludis la rolon de instruisto kaj gvidis bazajn kaj konversaciajn kursojn ĉe AAE kaj ekster ĝi; prelegis diversloke kaj intervjuiĝis. Dum pluraj jaroj li estis BEL-ano. Ni kondolencas al la familianoj de nia kara samideano forpasinta. BEL dankas al AAE la senditan leteron el kiu ni kaptis la nekrologajn informojn.

## ATENÇAO

Tomamos conhecimento da existência de uma "corrente" para enriquecimento rápido com base na remessa de 1 dolar para cada uma das 4 cópias previstas no seu funcionamento. Além de prática combatida pela polícia de repressão aos estelionatários, a referida "corrente" usa o Esperanto como camuflagem e fornece uma relação dos possíveis destinatários das cópias, contendo nomes e endereços de esperantistas. Não sabemos quem a iniciou; se foi por ignorar que a mesma é proibida; se foi por má-fé. Eis algumas frases por ela veiculada:

"Não se esqueça: trabalhe em silêncio! Sem alarde. Não traia a confiança depositada em você por seu amigo!"

"À esquerda e na parte superior do envelope escreva "Esperanto-Internacia kaj neutrala lingvo"

A Liga pede encarecidamente a todos que receberem cópia da mesma que interrompam a "corrente" para o bem do movimento esperantista

## ANONIMAJ MESAĜOJ SENDITAJ AL BEL

Lastatempe BEL ricevis mesaĝojn enhavantajn kelkajn konsiderojn pri la movado, pri individuoj kaj alvoko al esperantismo, sed sen la nomoj de la aŭtoroj. Kiam la mesaĝsendanto ne permesas ke la respondo revenu al li, ne okazas "komunikado" kaj la celita kontakto fariĝas sterila. Tiu ĉi noto celas atentigi al BEL-anaro kaj al ĉiuj esperantistoj, ke ni publikigos en LIGILO ĉiujn mesaĝojn interesajn por nia komunumo, kondiĉe ke ne estu anonimaj. Atentu ke anonima mesaĝo estas malpermesata laŭ la Brazila Konstitucio.

**LANÇAMENTO**

# Aprenda Esperanto

## *Método de Zagreb agora em Português*




* Método já editado em servo-croata, inglês, francês, alemão, italiano, húngaro, macedônio, maltês e kirundi

* Edição em Português preparada por Ronilson Mota e revisada por Leopoldo Knoedt

* Concebido para cursos em sala de aula e estudo autodidata

*Livro-texto e fita cassete

*Um lançamento Zamenhof Editores*

**Distribuidor exclusivo para o movimento esperantista (Atacado e Varejo) : Liga Brasileira de Esperanto - Caixa Postal 03625 - 70.084-970 Brasília(DF) Fone: (061) 226-1298**

## FAÇA JÁ O SEU PEDIDO

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**
Caixa Postal 3625, CEP 70084, Brasília (DF) Tel: 226-1298

IMPRESSO